

SZILVÁSI LÁSZLÓ – TEKSTO DE INTERVJUO POR LA REVUO ESPERANTO, 2014, APRILO

SINPREZENTO

>> komence, bonvolu sin prezenti kaj diri ion pri via agado por Esperanto, via vizio pri >> Esperanto kaj ties movado.

Malfacile mi povas kategorii min. Origine mi estis inĝeniero pri elektronikaj aparatoj de aviadiloj, sed ekde ĉ. 1987-88 mi okupiĝas seninterrompe pri Esperanto kiel mia ĉefa laborprofesio. Tamen mi NE estas dungito de iu asocio, mi laboras memstare kiel gvidanto de mia propra malgranda firmao.

Mi komencis lerni Esperanton en mia mezlerneja aĝo, kiel 15-jarulo. Mi vivis intensan Esperantan vivon, komence kiel simpla helpanto, aktivulo, organizanto de renkontiĝoj, poste kiel estrarano en diversaj organizaĵoj mi trairis la paŝojn de la kutima Esperanta kariero.

La radioelektronikan fakon de la universitato pri civila aviado mi finfaris en Sovetunio, sed kompreneble ankaŭ tie mi multe esperantumis. Post la hejmenveno en 1984 ni fondis nian entrepreneton Lingvo-Studio, kiu komencis sian agadon per eldonado de Esperantaj sonkasedoj kaj instruhelpaj materialoj

La entreprenaj taskoj puŝis min studi internacian komercadon, do mi diplomiĝis ankaŭ kiel ekonomi-kisto kaj specialiĝis pri merkatico. Tiu merkatica scienco poste iĝis mia dua hobbio, ŝatata ĉevalo.

En la periodo de la politika reĝimŝanĝo kun miaj similkarakteraj amikoj ni fondis plurajn novajn E-formaciojn: ni fondis memstaran Junularan E-Asocion, societon kun la nomo Kultura E-Asocio, kaj ni establis Fondaĵon Eszperantó. Nia entrepreno donis la infrastrukturon por la agado (oficejo, tekniko, administrado), kaj tiuj organizaĵoj formis iun kunlaboran blokon, helpis la agadon unu de la alia - kvazaŭ kiel konzorcio. Hodiaŭ oni konas tiun blokon kiel la budapeŝta "Esperanto-Centro Eventoj".

Inter 1992 kaj 2002 ni eldonis la gazeton Eventoj, kiu per sia 2-semajna aperitmo tiutempe estis "la plej ofta" Esperanto-gazeto. Mi fieras pri ĝia sukcesa 10-jara vivo, kaj fieras ankaŭ pri la atingitaj rekordoj (a, b, c, d) !!

Pro la alveninta revolucio en la komunikada teknologio en 2002 ni fermis la paperan gazeton Eventoj, kaj komencis okupiĝi pri alia temo, nome pri instruado de Esperanto. Kiel konate, por ricevi sian diplomon en Hungario studentoj devas havi ankaŭ ekzamenon pri iu lingvo, kaj ĝi ofte povas esti ankaŭ Esperanto. Kompreneble ĝi ne okazas en si mem, oni devas multe varbi kaj reklami por havi lernantojn de Esperanto. Ni elformis profesion lingvolernejon, kie 3 lernoĉambroj kun plena ekipo priservas nur Esperantajn celojn. Laŭ miaj informoj ĝi estas la plej (?) granda tia institucio en Esperantujo. Laŭ kontrakto laboras ĉe ni 4-6 instruistoj. En la tradiciaj, klasĉambraj kursoj lernis ĉe ni pli ol 3000 homoj.

Ne estas vaste konate, ke jam de pli ol 10 jaroj ni funkciigas unikan, propran pagan interretan kurson, kiu gvidas la lernantojn de la nula nivelo ĝis la mezgrada ekzameno B2. Ne temas pri la kurso de Lernu, estas tute sendependa afero. Ni fieras, ke malgraŭ la senpaga konkurenco de "Lernu" pli ol 4000 homoj elektis nian pagan kurson. Ne estis simpla tasko atingi tion...

Kompreneble por havi bonan rezulton oni devas havi ankaŭ bonajn instruilojn, do ni mem verkis aron de instuiloj, kiu ŝajne formas la plej (?) ampleksan instrupakaĵon (a,b,c,d,e...).

Kompreneble ni faras serion de aliaj, movadaj taskoj: funkciigas unikan interretan vortaron, pluraj servojn kiel STEB, Ret-Info kaj aliaj, paĝojn en fejsbuko, zorgas pri reklamo, radio kaj tv-intervjuoj, produktas filmojn kaj muzikajn materialojn, kaj ankaŭ partoprenas en la loka Esperanta vivo.

Mi posedas kaj prizorgas la retejojn esperanto.hu / eszperanto.hu / eventoj.hu / kaj dekon da aliaj por la fondaĵo, asocio, lingvolernejo, entrepreno, ktp. (pri la lingvokursoj vidu ekzemple www.eszperanto-tanfolyam.hu ankaŭ en Esperanto)

Nia formacio ne kongruas kun la kutima strukturo de la Esperanto-movado, kaj niajn rezultojn ne ĉiuj digestas facile. Ekzemple la Esperanto-sekto "Civito" distingis min (kiel redaktoron de Eventoj) per honorigo de "persona non grata" en 1999, sed pri niaj rezultoj kaj rekordoj aperis eĉ ne unu vorto en revuo de ILEI kaj aliaj edukaj organoj, kaj ankaŭ la estraranoj de la tradicia landa asocio ne estas partneroj.

Persona retpaĝo kun datumoj kaj retligoj: <http://www.eszperanto.hu/szilvasi/>

Kun salutoj, László

Fabrício Valle - Unua demando. La respondo sendu al redakcio@revuoesperanto.org : Kiel tre sperta, aktiva kaj hardita esperantisto, kiel vi bildigus la Esperanto-movadon, kun ĝiaj mankoj kaj ĝiaj plej valoraj trajtoj?

Mi pensas, ke Esperanto estas varo, por kiu validas la samaj merkataj leĝoj kiel por ĉiu alia varo. Tamen, ĝiajn prizorgantojn, la funkciulojn de la Esperanto-movado oni elektas ne laŭ manaĝeraj aŭ merkataj kapabloj, sed laŭ ilia lingvoscia aŭ alia socia nivelo. Tio estas negativa trajto.

Mi asertas, ke ekzistas du-specaj kapitaloj. La unua estas la tradicia formo de financaj valorajoj, mezureblaj per mono. La dua speco de kapitalo estas la internacia, persona ligo-reto, kiu en la hodiaŭa mondo estas ege valora. La tradician kapitalon oni povas ricevi aŭ heredi, la personan retligaron ĉiu devas elformi mem. Esperanto kaj la Esperanto-movado multe simpligas tiun taskon, kaj multe plifaciligas elkonstrui tiun kontakto-reton, kies valoro estas ne pritaksebla. Tio estas unu el la plej pozitivaj flankoj de Esperanto.

>> La aserto, ke Esperanto estas varo ne facile akceptiĝos ĉe multe da esperantistoj, kiuj tre profunde flegas la internan ideon, la idealisman flankon de Esperanto. Certe estas eble kombini idealismon kun pragmatismo, sed kiel superi la rezistan sintenon de la esperantistaro?

Mi ne pensas, ke oni devus ŝanĝi la sintenon de ordinaraj esperantistoj - oni uzu la lingvon kaj havu entuziasmon! Tiu entuziasmo tamen ne signifas rifuzon de profesinivela agado, sed por sukceso la gvidantoj kaj organizantoj devas havi merkatikecan vidmanieron.

La Esperanto-movado estas tro malgranda por bazi ĝin sur profitdona principo. Same kiel aliaj civilaj movadoj ankaŭ ni devas baziĝi sur volontula agado, des pli, ke la teknologia evoluo simpligas kaj malkostigas la tradiciajn oficejajn taskojn. Kompreneble ekzistas kelkaj taskoj, kiuj pro troa tempopostulo estas plenumebaj nur kontraŭ financa rekompenco, sed tiuj financaj aferoj devus esti multe pli publikaj ol hodiaŭ.

Mi opinias, ke al la lastatempa falo de entuziasmo en la movado kontribuis ankaŭ la mono-abundo de la pasintaj jaroj. En la movado fluis klaĉoj pri dekmiloj kaj centmiloj da dolaroj de subvencioj al iuj personoj kaj projektoj, kaj tiu nepublika trajto certe ne instigis aliajn aktivulojn labori senhonorarie... Kiam antaŭ kelkaj jaroj ni invitis novajn kunlaborantojn al nia projekto Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB, oni daŭre demandadis pri la "buĝeto", kaj oni simple ne kredis, ke ni ne havas eksterajn financojn por tio. Bedaŭrinde ankaŭ tiu sinteno influis nian decidon haltigi la projekton.

>> Vi delonge agadas kiel profesia esperantisto, prenante Esperanton kiel varon.

>> Ĉu valoras la penon? Kiuj estas viaj plej elstaraj atingoj kiel Esperanto-entreprenisto?

Mi lernis Esperanton en mia mezlerneja aĝo, kaj multe aktivis ankaŭ en la tradicia E-movado. En 1984 mi fondis nian firmaon, kaj ekde 1987/88 mi estas plentempa aŭ profesia esperantisto. Mi do ĝuas unikan situacion: mia laboro egalas al mia hobbio, mi ne estas dungito, tutan tagon mi povas okupiĝi pri Esperanto, tio vivtenas min - do plene valoris la penon. Tamen ni estu sinceraj: funkciigi kaj sukcese gvidi iun Esperantan entreprenon postulas la saman laboron, sciojn kaj penon kiel neesperantistan entreprenon - kaj tio ne estas simpla afero.

Mi estas fiera pri multaj niaj atingoj kaj rekordoj, ja en pluraj kampoj ni estis pioniroj el movada vidpunkto. Eble la plej gravaj estas la sekvaj:

- Antaŭ la interreta epoko, inter 1992-2002 dum 10 jaroj ni sukcese eldonis la tiam plej oftan Esperanto novaĝgazon Eventoj. Ĝi atingis pli ol mil abonantojn en pli ol 65 landoj, aperis 244 numeroj kun pli ol 1970 paĝoj...! Al Eventoj ligiĝas pluraj rekordoj, eble la plej interesa (kaj ĝis nun nekonata) estas tio, ke ĝi estis la unua E-gazeto, kiu havis regionajn represaĵojn: la budapeŝta preseja originalo estis sendita per rapida poŝto al Pollando, Rusio kaj Litovio, kie oni presis kaj distribuis ĝin al enlandaj abonantoj - kun aldono de sia enlanda informilo...
- Ekde dekelkaj jaroj ni funkciigas Esperanto-Lernejon, kiu estas verŝajne la plej (?) granda en Esperantujo. Nia propra instrua centro en 110 kvadratmetroj havas 3 komplete instalitajn lernoĉambrojn, kie la Esperantajn kursojn gvidas 5-8 instruistoj laŭ kontraktoj. Lernis la lingvon ĉe ni ĝis nun pli ol tri mil personoj. (!)

- Pro manko en la merkato de taŭgaj profesinivelaj materialoj ni komencis ellabori proprajn, novajn instruilojn. Laŭ mia scio nuntempe la pakaĵo "Sukcese ĝis la E-ekzameno..." estas la plej ampleksa lernilo-kompleto en Esperantujo, konsistanta el pli ol 10 integraj eroj. La ĉefajn elementojn de la instrupakaĵo uzas ne nur niaj propraj instruistoj, sed ĉ. 60 aliaj instruistoj, kursgvidantoj dise en la lando.
- Kaj fine la plej fierita: Ekde 2003 - do jam de 11 jaroj - ni funkciigas propran, unikan, pagan (!) interretan kurson por hungaroj. NE TEMAS pri la Lernu-kurso, ni mem konstruis propran kurso-sistemon de nulo ĝis B2 (= meza nivelo), sen financado fare de ESF aŭ de alia asocio... Ne estis simple atingi, ke pli ol 4000 homoj elektu nian pagan kurson anstataŭ la senpaga Lernu...

Kompreneble tiuj estis nur plej gravaj atingoj, en kadro de mallonga intervjuo ne eblas listigi ĉiujn. Mi funkciigas la retejojn www.esperanto.hu kaj www.eventoj.hu - tie oni povas trovi pli detalajn informojn pri niaj diversaj projektoj kaj servoj, kiel STEB kaj Internacia Kalendaro, kaj aliaj.

>> En Hungario por ricevi la diplomon en la universitatoj oni devas ekzameniĝi pri iu lingvo, sed lavango da E-lernantoj, trapasinte la ekzamenon, kabeas. Kial la E-movado apenaŭ sukcesas reteni la novbatikojn?

Pri tio kulpas ne la eksaj kursanoj, sed la tradicia movado mem, kaj ĝiaj gvidantoj. Por tiuj studentoj Esperanto estas unu el la ordinaraj studobjektoj, sed dum la kurso multaj el ili entuziasmiĝas ankaŭ pri la movada flanko. Post la ekzameno tamen forŝiriĝas la sola instruista fadeno kiu ligis ilin al Esperanto, kaj sen pliaj impulsiloj la entuziasmo malestingiĝas. Post duonjaro aŭ 1-2 jaroj oni eble gardas bonan impreson pri Esperanto, sed jam estas tre malfacile mobilizi ilin partopreni iun ajn movadan aferon.

La fenomeno estas la sama, kiel en la tuta Esperanto-movado.

Ĉiu esperantisto restas en la movado pro iuj personaj avantaĝoj: ĉu pro amika societo, ĉu pro favorkondiĉaj feriebloj, ĉu pro ĝuo de la plenumita movada pozicio, ktp. Mi opinias, ke la vera interna motivo ĉe ni ĉiuj estas la personaj ligoj, la trovita amika kompanio, societo. En la movado restas nur tiuj personoj, kies bezonoj en tiu kampo estas kontentigitaj. Se tiuj altirfortoj rompiĝas, kaj ne plu ligas nin la pozitivaj personaj fadenoj - oni simple retiriĝas el la movado...

Por reteni do tiujn multajn kursanojn, oni devus zorgi pri elformado de iliaj personaj kontaktoj. Oni devus organizi serion de malgrandaj, lokaj renkontiĝoj kun cel-orientita programo, kaj flegi la kontakton kun ili por teni freŝa la entuziasmon. Bedaŭrinde la tradiciaj movadaj strukturoj ne estas pretaj plenumi tiun taskon, mankas la manaĝerado - je kio mi aludis en la unua demando.

>> Refarita demando: Kian rolon havas interreto en la velkiĝo de la tradiciaj movadaj strukturoj kaj ŝrumpado de la membraro de ĝiaj organizaĵoj, kiel UEA. Ĉu ĝi ne devus esti faktoro de plivigliĝo?

Interreto mem estas tre efika helpilo por esperantistoj, ja ni vivas diasporece dise en la mondo. Pro globaliĝo kaj interreto fundamente ŝanĝiĝis la socia komunikado, la eksteraj cirkonstancoj, sed la tradiciaj Esperanto-organizaĵoj (simile al multaj aliaj neesperantistaj civilaj organizaĵoj) nur parolas pri tio, sed ne adaptiĝas al la novaj kondiĉoj.

Pro interreto, pro la nova metodo de komunikado ŝanĝiĝis ankaŭ la rolo de Esperanto-organizaĵoj. Ĝis nun en la praktiko ilia ĉefa tasko estis peri la informojn pri la konkretaj ebloj de lingvouzado (diskonigo kaj varbado al renkontiĝoj, radioelsendoj, novaj literaturaĵoj, kulturaj varoj ktp.). Tiujn informojn ĝis nun oni povis akiri nur pere de membreco en iu asocio. Hodiaŭ tio ne plu veras, oni povas esperantumi, akiri ĉiujn informojn kaj uzi la lingvon sen ajna membreco! Kial do oni iĝu membroj en iu E-asocio, kial do oni pagu kotizon? - oni devas repensi la respondon.

Interreto donas tre efikajn ilojn por priservi la jamajn parolantojn - eĉ unu aŭ kelkaj personoj povas funkciigi tutmondajn servojn, kiel tion pruvas la ekzemploj de Libera Folio, Vinilkosmo, Eventoj, Esperantoland, Sezonoj kaj aliaj. Fakte ili priservas "klientojn", sed ne "membrojn".

Tiu fenomeno ne estas nova. La gazeto "La Merkato-96" de IKEF jam en 2008 demandis en sia artikolo: Ĉu asocioj bezonas membrojn? - kaj Lu Wunsch-Rolshoven verkis artikolon en Berlina

Informilo en 2005 pri la ebla neceso apartigi la por- kaj per-esperantaj organizaĵojn - laborantaj por disvastigi la lingvon resp. por priservi la jamajn parolantojn.

Priservi klientojn tamen estas tasko, postulanta manaĝerajn kaj merkatakajn konojn - do multaj gvidantoj de landaj kaj lokaj asocioj ne faras tion.

Kiel solvo, mi povas imagi, ke en la estonto Esperanto-organizaĵoj membrigos nur tiujn aktivulojn, kiuj volas konkrete kontribui al la disvastigo de Esperanto - kaj la aliajn Esperanto-parolantojn helpas per diversaj servoj, kiel klientojn. Anstataŭ plenrajtaj (kaj voĉdondevaj) membroj, oni povus ligi la individuojn al lokaj aŭ internaciaj asocioj per "subtena membreco", aŭ "amika societo" aŭ similaj formacioj, kiuj donas kaj pozitivan senton, kaj la eblon por priservado (kaj peti financon kontribuadon).

.....

Interreto donas efikajn rimedojn por priservado de la komunumo: fejsbuko, blogoj, vivaj retaj TV-elsendoj kaj aliaj donas multajn eblojn, eĉ ebligas virtualajn ĉeeston en vivaj renkontiĝoj...

Laŭ mia sperto restas en la movado ĉefe tiuj personoj, kiuj havas ankaŭ personajn konatojn, do kiuj iam fizike partoprenis renkontiĝojn kaj kunvenojn, kaj elformis homajn kontaktojn. Por ili interreto tre multe helpas. Aliflanke la homoj, kiuj venis al Esperanto nur per interreto, eĉ se ili estas entuziasmaj, sen vivaj personaj kontaktoj kutime post iom da tempo perdas la interesiĝon.

Interreto do estas tre efika, tamen ne anstataŭas la personajn kontaktojn. Ĝi estas rimedo, sed ne la celo...

>> La hungara E-movado havis glorajn tempojn. Kial forfalas la erao de la grandaj korifeoj kaj grandiozaj iniciatoj kiel la revuo Hungara Vivo? Ŝajne okazis same al la tuta movado.

En la unuaj cent jaroj elformiĝis la tradiciaj agadkampoj, sed nesukceson de la diversaj projektoj (*aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj, varbado, ktp.*) oni ĉiam povis pretekstigi al ekstera kaŭzo: "...ni vivas diaspore, kaj la geografiaj distancoj malebligas ĉion..." - Tamen kelkaj projektoj estis pli sukcese manaĝitaj, kaj ni nun rigardas ilin kiel grandiozaj iniciatoj.

En la lasta jardeko pro globaliĝo kaj interreto la mondo iĝis malgranda, signifo de la distancoj multe reduktiĝis - sed la Esperanta komunumo ankoraŭ ne adaptiĝis je tio. Estas necesa tempo por transformiĝo de la movada strukturo. Komprenoble ankaŭ la kresko de naciismo en la ekstera mondo havas bremsan efikon, ja ni devis kompreni, ke nur uzado de la sama lingvo ne solvas la interpopolajn problemojn...

>> Kiel fakulo pri merkatico, kiujn zorgojn vi proponus por ke iniciato sur la kampo de E-instruado estu sukcesoplena? Ĉu vi kredas, ke la argumentaro uzata de esperantistoj taŭgas?

Kion signifas "sukceso" en la instruado? - Mi pensas, ke antaŭ ĉiu projekto oni devus starigi kaj respondi la demandon: Kio estas la celo, KONKRETE kion mi volas atingi? La necesaj metodo kaj rimedoj multe dependas de tio!

Se la celo estas prepari homojn al lingvoekzameno - gravas la bonaj instruiloj. Se per la kurso ni celas havi estontajn vizitantojn de E-renkontiĝoj - ni devas koncentri nin je elformado de kluba etoso, ĉe funkciigo de reta kurso ni devas aparte flegi la personan kontaktadon, kaj tiel plu.

Okazis anataŭnelonge, ke lige al jubilea jaro iu E-organizaĵo decidis lanĉi novan interretan kurson. Oni elspezis milojn da eŭroj kaj milojn da laborhoroj por verkado de studmaterialo, sed dum du jaroj neniu levis la demandojn: Kio estas la celo? Kiuj lernos pere de tiu ĉi kurso? Kial oni elektos ĝin anstataŭ la jam ekzistanta Lernu? Kiu funkciigos tiun ĉi kurson, kiuj korektos la taskojn, kaj kiuj estos la kondiĉoj? - El kio devas konsisti la kurso, ke ĝi havu ian ŝancon resti viva?...

Cetere similajn demandojn oni devus respondi ĉe Esperanto-organizaĵoj, ĉe organizado de ĉiuj Esperanto-renkontiĝoj kaj projektoj: Kio estas la celo, KONKRETE kion ni volas atingi?

Se ni sukcesis formuli la respondon, venas la sekva demando: kiel trovi lernantojn, kaj kio estas ilia vera motivo?...

>> Esperanto 9 – Ĉu utilas havi klaran ideon pri tio, kion oni konkrete volas, se ne estas rimedoj nek homoj nek financaj? La movado ĝisfunde dependas de volontula laborforto kaj monakirado signifas por E-organizaĵoj monon el kotizoj. Ĉu ekzistas alternativo por tio?

Des pli grave estas havi konkretigitajn celojn, ju malpli da rimedoj oni havas! Nur tiel oni povas havi realajn celojn kaj eviti la malsukcesojn...

La volontulan karakteron de nia agado mi ne vidas problemo, sed ĝi ne devas esti "mojosa" (= farita kun entuziasmo sed sen fakaj konoj, amatora, fuŝa), oni povas agi profesinivele ankaŭ kiel volontulo.

Parton de la necesaj enspezoj povas doni la kotizoj, sed ekzistas ankaŭ pluraj aliaj kanaloj:

- Mi nun ne detaligu la tradiciajn eblojn kiel instruado de Eo, eldonado, organizado de aranĝoj, koncertoj, ktp.
- Malantaŭ ESF kaj UEA staras serioza kapitalo, pere de kiuj oni povus financi multajn Esperantajn projektojn, kaj krom ili funkcias ankaŭ aliaj financaj kanaloj kaj lokaj fondaĵoj. Por havi la ŝancon ricevi helpon - oni devas peti ĝin...
- En multaj landoj - ĉefe en Eŭropo - oni povas akiri multajn ŝtatajn subvenciojn, destinitajn por la civila sfero.
- Ekzistas subvencia sistemo de Eŭropa Unio, kiu ĵetas la monon per grandaj sakoj al kulturaj- edukaj-studaj projektoj, ofte tute akordiĝantaj kun niaj Esperantaj celoj. Ekzemple sole E@I akiris centmilojn (!) da eŭroj el tiu fonto, gajnis per ĝi ankaŭ pluraj tradiciaj E-organizaĵoj, kaj naskiĝis eĉ esperantista privata firmaeto, kiu - pro manko de konkurenco - iĝis riĉa melkinte ilin je 30 %-oj pro verkado de konkursaj materialoj... (Fakte tiun laboron povus/devus fari UEA aŭ TEJO.)

Tiuj monfontoj ekzistas, sed ili ne venas per si mem al ni, oni devas aparte labori por ricevi ilin. Mi povus imagi, ke la eŭropaj landaj asocioj, kaj eĉ ankaŭ UEA nun dungus apartan personon kun la tasko verki konkursprojektojn kaj akiri monon el la kaso de EU...

Financoj do ekzistas, sed kompreneble estas alia demando, kiom efike oni uzas la akiritajn subvenciojn - kaj ĉu oni uzas ilin por la celoj de la Esperanto-movado?

>> Ĉu vi revas pri grandega sukceso de via entrepreno en baldaŭa estonteco, okaze de eventuala amasa kaj ekfurora disvastiĝo de Esperanto? Alivorte, ĉu la esperantista ekonomio brilos kaj vi estas preparita por profiti el tio?

Bedaŭrinde mi ne vidas reala la baldaŭan amasan disvastiĝon de Esperanto. En la organizita E-movado mi vidas nur malmultajn homojn kun manaĝeraj kapabloj, kaj tiel ni ne povas eluzi eĉ la eventualajn brilajn okazojn - kiel tion montras la ekzemplo de la hungaria amasa lernado.

Estas tamen interese rimarki, ke lastatempe prosperas pluraj iniciatoj, manaĝitaj de individuoj aŭ de malgrandaj grupoj, ne ligitaj al iu tradicia E-asocio: Libera Folio de Källe Kniivila, Esperantoland de Lu Wunsch-Rolshoven, Eventoj ĉe ni, Sezonoj kun Korĵenkov, Vinilkosmo kun Flo, Esperantotur kun Grzebowski, retradio de Anton Oberndorfer, novaĵportalo de Robert Poort kaj pluraj similaj - do aperis ĝermo de la nova manaĝera generacio.

Mi resumu la aferon: Nia movado funkcias en merkataj cirkonstancoj. Se ni volas sukcesigi Esperanton, disvastigi ĝin kaj ĝian uzadon, ni devas uzi merkatajn metodojn kaj profesinivele manaĝi niajn projektojn.

